# ĈINA FERVOJISTO

# 中国铁路职工世界语者

## 2014.1



火车奔驰在中华大地，世界语联系世界人民

***La trajno galopas sur la ĉina lando,***

***Esperanto ligas la popolojn.***

# ENHAVO

★ TOTALA LONGO DE LA ĈINAJ FERVOJOJ SUPERIS 100 000 KM-OJN ---------------------------------------------------------------------- 1
★ LA FERVOJFAKKUNSIDO DUM LA 10-A ĈINA KONGRESO DE ESPERANTO ------------------------------------------------------------------------------ 2
★ KUNSIDO DE LKK PRI LA 67-A IFK ------------------------------------------ 2
★120 ĈINAJ STUDENTOJ PARTOPRENIS EN ESPERANTO-KURSO- 3
★ MIA VOJAĜO EN EŬROPO PER ESPERANTO (IV) --------------------- 4
★ EL FERVOJA MONDO 5/2013 -------------------------------------------------- 7
★ALIĜILO,ĈAMBROMENDILO,ĜENERALAJ INSTRUKCIOJ, ANONCO PRI LA FAKPRELEGOJ KAJ PROVIZORA PROGRAMO POR LA 67-A KONGRESO DE IFEF------------------------------------------- 9
★ SKIZO PRI KUNMING ------------------------------------------------------- 14

**Frontpaĝe:**

**KONGRESEJO DE LA 67-A KONGRESO DE IFEF -- PITORESKA KUNMING-A ARTA PROFESIA KOLEGIO EN LA PRINTEMPA URBO KUNMING, ĈINIO**

# TOTALA LONGO DE ĈINAJ FERVOJOJ SUPERIS 100 000 KM-OJN


La tago de la 28-a de decembro 2013 estas speciale memorinda en la historio de la disvolviĝo de la ĉina fervojo. En tiu ĉi tago samtempe funkciis la fervojlinioj Xiamen-Shenzhen-a, Xi'an-Baoji-a grandrapida, Liuzhou-Nanning-a speciale pasaĝera, Hengyang-Liuzhou-a, Chongqing-Lichuan-a, Guangxi-provinca ĉemara kaj aliaj linioj. En la sama tago la longo de la funkciintaj fervojlinioj de la ĉina fervojo longiĝis je 2 000 km. kaj superis 100 000 km.

Kun la fondado de la fervojreto de cent mil km., de la nula horo de la 28-a de decembro 2013, la Ĝenerala kompanio de la ĉina fervojo ekfunkciigis la novan vagonaran veturdaŭran tabelon,laŭ la tabelo aperas 75 paroj da aldonitaj pasaĝertrajnoj kaj la nombro de ĉinaj fervojoj atingis 2369 parojn.

Laŭ la statistiko de la Ĝenerala kompanio de la ĉina fervojo inter 100 000 km. estas pli ol 40 mil km. da fervojlinioj kun la rapido de 120 km/h, pli ol 20 mil km. -- kun la rapido de 160 km/h, pli ol 10 mil km. da grandrapidlinioj kaj 12 mil km. da konstruantaj grandrapidlinioj. Tio faris Ĉinion la lando posedanta la plej longajn grandrapidajn fervojliniojn funkciantajn kaj konstruantajn en la mondo. Krome, la longo de la dutrakaj linioj estas 46 mil km., la longo de la elektraj linioj atingis 54 mil km. La fervojlinioj en la okcidenta Ĉinio longiĝas de la antaŭaj malpli mil km. ĝis 38 mil km.

En la cent mil kilometra konstruada kaj funkciada praktikado de la ĉina fervojo, ĉinoj ĉiuflanke posedas aŭtomat-regadan teknikon de vagonaroj, sukcese realigis miksan veturadon de diversgradaj trajnoj, efektivigis la reciprokajn konektadon kaj traveturadon de la grandrapidaj kaj ordinaraj vagonaroj, fondis la sekurecan sistemon de la preventado risko, realigis la plenampleksan kontroladon kaj riparadon de trajnoj, linioj, pontoj kaj kontaktretoj.

Laŭ reviziita《La fervojreta projekto de la mez-longa periodo》, en 2015 la funkcianta longeco de la ĉina grandrapida fervojo atingos 19 mil km. En 2020 la funkciontaj fervojlinioj de la ĉina fervojo superos 12 mil kilometrojn. La grandrapida pasaĝertrajna reto baze kovros la ĉiujn provincĉefurbojn kaj la urbojn kun 50 mil da loĝantoj de Ĉinio. ■ -- ***Han Zuwu***



# LA FERVOJFAKKUNSIDO DUM LA 10-A ĈINA KONGRESO DE ESPERANTO

En la 16-a de novembro 2013 okazis fakkunsido de Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio dum la 10-aĈina kongreso de Esperanto en Zaozhuang,provinco Shangdong. La kunsidon ĉeestis la parto de LKK-anoj de la 67-a IFK, inter ili estas s-ro Duan Yongxing,direktoro de la Kunming-a Profesia Arta Kolegio,s-ro Han Zuwu, prezidanto de ĈFEA,s-roj Xiao Ke kaj Wang Minhao,vicprezidantoj de ĈFEA, s-ro Zhang Lianjin de Kunming-a Profesia Arta Kolegio, s-ro Zhang Dali, ĝenerala sekretario de ĈFEA kaj aliaj membroj de ĈFEA. La ĉeestantoj diskutis ĉefe pri la prepara laboro por la 67-a IFEF-Kongreso en Kunming en 2015. Estis decidita,ke en la jarfino renkontiĝos LKK de la 67-a IFEF-Kongreso en Kunming por esploradi pri la kongresejo,manĝejoj,hoteloj,trafiko, vidindaĵoj ktp. ■ **-La red.**




# KUNSIDO DE LKK PRI LA 67-A IFK

De la 23-a ĝis 27-a de decembro 2013 ĉefaj LKK-anoj renkontiĝis en Kunming kaj kunsidis pri la preparado por la IFEF-kongreso okazonta en Kunming de Ĉinio en 2015. La kunsidon ĉeestis s-ro Duan Yongxing, direktoro de Kunming-a Arta Kolegio, prezidanto de ĈFEA s-ro Han Zuwu veninta de Tianjin, vicprezidanto de ĈFEA s-ro Wang Minhao veninta de Shanghai, s-ro Zhang Lianjin kaj s-rino Xie Min de Kunming-a Arta Kolegio kaj aliaj LKK-anoj. Ili detale diskutis rilate al la aliĝilo, ĉambromendilo, programo kaj aliaj dokumentoj de la 67-a IFK en 2015. Dume ili faris esploradon pri la kongresejo kunvenejoj, loĝejoj, hoteloj, manĝejoj, vidindaĵoj, flughaveno, trajna stacidomo, Fervojmuzeo ktp. Krome LKK decidis funkciigi la Esperanto-kurson en aprilo 2014 por ke la kursanoj fariĝu la venontaj volontuloj. ■

**-La red.**



# 120 ĈINAJ STUDENTOJ PARTOPRENIS EN ESPERANTO-KURSO

En la 16-23 de majo de la venonta jaro okazos la 67-a Kongreso de IFEF kaj la 11-a Ĉina Kongreso de Esperanto en Kunming de Yunnan-provinco. Por kulturi novajn esperantistojn kaj volontulojn estis funkciigitaj la Esperanto-kursoj en la Profesia Arta Kolegio.

En la 21-a de aprilo 2014 ekfunkciis la Esperanto-kursoj, kiujn partoprenis 120 studentoj el kelkaj fakultatoj de la kolegio, el ili 40 studentoj venis de la aviada fakultato. Ili lernos nian lingvon por unu jaro Sinjoro Wang Minhao, prezidanto de Shanghai-a Esperanto-Asocio kaj itala esperantistino Alessandra Madella kiu laboras en la Media Fakultato de la Kolegio, estas instruantoj por la Esperanto-kurso. ■

*- La red.*






*Nova konstruanta fervoja muzeo en Kunming*




*Malnova fervoja muzeo en Kunming*

# MIA VOJAĜO EN EŬROPO PER ESPERANTO（IV）

**HAN ZUWU**

### Vizito al la urbo Lodz de Pollando

Lodz, la dua granda urbo de Pollando, ĝemeliĝis kun la urbo Tianjin en la 11-a de oktobro de la jaro 1994. En la jaro 1998 la Tianjin-a E-Asocio sendis sian delegacion al la urbo Lodz kaj laŭinvite partoprenis en la 29-a Tutpollanda Kongreso de Esperanto kaj en la celebrado por la 90-jariĝo de la Lodz-a E-movado. En la jaro 2002 d-ro Tadeusz Ejsmond, samideano el la urbo Lodz vizitis Tianjin. En la jaro 2008 mi, reprezentante la Tianjin-an E-Asocion, refoje vizitis la urbon Lodz, post partopreno en la 60-a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso, kaj pluapaŝe intimigis la amikecan rilaton inter la dulandaj E-organizoj.




*La aŭtoro (la dua de dekstre en la unua vico) kune kun lodz-aj samideanoj*

Dekkelkaj membroj el la Lodz-a E-Asocio kaj ni intervidiĝis kaj varme brakumis kiel familianoj. Al ili mi rakontis miajn travivaĵojn dum la vojaĝo en Eŭropo kaj poste al ili mi prezentis la situacion de la Tianjin-a E-Asocio kaj konigis informojn pri la 45-a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazonta en Kunming de Ĉinio julie de la kuranta jaro kaj tiel plu. Fine, mi sincere invitis lodz-ajn esperantistojn viziti Tianjin kaj Ĉinion. Raportistoj el la Lodz-a Televida Stacio faris intervjuon kun s-ro Robert Kaminski kaj mi pri la rilatoj inter la E-organizoj de la du ĝemelaj urboj, iliaj amikecaj interkomunikadoj kaj disvolviĝo kaj ankaŭ pri aliaj aferoj. Esperantistoj de la du ĝemelaj urboj atingis la komunan konon, t. e. pluapaŝe intimigi la rilatojn inter la du urbaj E-organizoj, pluapaŝe oftigi plurkampajn interŝanĝojn kaj reciprokajn agadojn de la du urbaj E-asocioj, kaj pluapaŝe esplori pri la vojo servi per Esperanto al la ekonomiaj konstruo kaj evoluo de la du urboj.




*Antaŭ la reliefaĵo de Zamenhof ĉe la strato Centrum*

**Vizito kun respekto al la monumento de L. L. Zamenhof**

Varsovio, ĉefurbo de Pollando, estis la lasta loko, kiun ni vizitis dum nia vojaĝo en Eŭropo. En la 31-a de majo ni faris viziton kun respekto al la monumento de L. L. Zamenhof, akompanate de lokaj samideanoj Alina Mozer kaj Justyna Lisiecka. En la 14-a de aprilo de la jaro 1917, L. L. Zamenhof forpasis pro kormalsano kaj du tagojn post lia forpaso oni enterigis lin en la hebrea tombejo de Warszawa ĉe la strato Okopowa. En la jaro 1954 Unesko de la Unuiĝintaj Nacioj nomumis d-ron L. L. Zamenhof per "Famulo de la monda kulturo" pro lia kontribuo al la homaro. En la n-ro 49 / 51 de la strato Okopowa silentas ordinara tombejo publika por judoj. Laŭ kutimo, viroj ne povas eniri en la tombejon de judoj kun la kapo nuda. Pro tio, gardisto de la tombejo pruntedonis al ni ĉiuj ĉapon en formo de plado. Ni, kondukitaj de Alina Mozer kaj Justyna Lisiecka, rekte venis al la tombоŝtono de L. L. Zamenhof tute apud vojo. La bazo de la tomboŝtono sidas sur loko pli alta ol la vojo je pli ol unu metro kaj de la bazo de la tomboŝtono al la vojorando formiĝis kvadrata delikvo je du kvadrataj metroj, en kies centro estis pavimita per rulŝtono la verda stelo kaj la lumoj elradiitaj de la verda stelo. Sur la supro de la tombo estas ronda terglobo, kaj sur la fasado legiĝas jenaj vortoj en Esperanto:

**“ Doktoro**
**Lazaro Ludoviko**
**Zamenhof**
**Kreinto de Esperanto**
**Naskita 15-XII-1859**
**Mortis 14-IV-1917 ”**




*Tomboŝtono de L. L. Zamenhof en la hebrea tombejo de Warszawa ĉe la strato Okopowa*

Laŭ kutimo de judoj, ni prezentis anstataŭ floroj kelkajn rondajn ŝtonojn al nia majstro antaŭ lia tombo por esprimi al li nian respekton kaj amon.

Apud la tombo de L. L. Zamenhof sidas tiu de lia edzino Klara Zamenhof. Ili kune vivis dum 30 jaroj ne nur kiel geedzoj amantaj unu la alian en la vivo, sed ankaŭ kiel kolegoj helpantaj unu al la alia en la kariero. Eĉ dum milito, pro tio ke Esperanto iom similas al la germana lingvo, la tiamaj aŭtoritatoj de Varsovio suspektis ke L. L. Zamenhof estis "spiono" kaj poste li estis kondamnita kiel "perfidulo". Iu raportisto intima kaj pia al Rusio eĉ atakis L. L. Zamenhof per tio, ke li estas "danĝera internacia persono". Kiel ajn, la edzino de L. L. Zamenhof restis ĉiam optimista kaj montris sian viglecon, senlace zorgis pri la vivo de sia edzo kaj helpis al li aranĝi la aferojn en la laboro. Post forpaso de la edzo, ŝi kun pieco tenis la originan aranĝon de la kabineto de la edzo en la loĝejo en Varsovio, per tio ŝi gardis sian profundan amon al la edzo.

En la tombejo mi multe pripensis. Esperanto kreita de L. L. Zamenhof antaŭ 125 jaroj ne nur estas lingvo, sed ankaŭ estiĝas en ĝi idealo, t. e. la monda paco kaj diversnaciaj popoloj de la homaro kunvivas en egaleco kaj kun intimeco kiel familianoj. Kaj ĝuste pro tio, la esperantistoj el diversaj landoj kun kiu ajn ŝtaneco kaj nacieco povas respekti unu aliajn, kaj ekzistas inter ili aparta sentimento kaj intimaj rilatoj. Kiam oni lernas kaj uzas Esperanton kun tia idealo, oni havas senlime grandan energion.

Kvankam L. L. Zamenhof forpasis jam antaŭ 95 jaroj, tamen lia nobla moralo kaj granda spirito vivas ĉiam en la koro de ĉiuj esperantistoj kiel neelĉerpebla fonto de la fortoj! ■

# EL FERVOJA MONDO 2/14

**Ĉeĥio**: ***Branĉtraka trafiko en Liberec revivis***

Nordĉeĥa urbo *Liberec*, gastiganto de la 63-a IFEF-kongreso en 2011, estas konata pro sia ne tre ampleksa, tamen tre interesa tramtrafiko. Unuaj tramoj en la urbo komencis trafiki en jaro 1887, kaj tramvojreto iom post iome kreskis.



En 1950-aj jaroj la tramvojreto estis kompletigata je interurba linio iranta tra *Vratislavice* kaj *Proseč* al urbo *Jablonec nad Nisou*. En jaroj 1990-2005 urba linio estis alikonstruata por normala ŝpuro 1435 mm, kaj linioparto *Lidové sady – Viadukt* ricevis tri relojn, por ebligi ekspluatadon de ambaŭŝpuraj veturiloj sur la sama trako.
En 1990-aj jaroj estis klare, ke se trama trafiko deziras konservi siajn klientojn, devas alkonformiĝi al modernaj evolutendencoj. Tio koncernis plejparte trafikon de basplankaj veturiloj. Pro tio printempe en 1998 aperis en *Liberec* proporcie unika veturilo – tramo *RT6S*. Tiu ĉi de aliaj veturiloj *RT6N* diferencis koncerne uzon de alia ekipaĵo, kaj precipe de malaltigita basplanko al boĝioj de randartikoj. Post konstruo en entrepreno *ČKD* ĝi ĉirkaŭ unu jaron (1997-1998) provtrafikis en *Praha,* kaj fine de jaro 1998 ĝi komencis transporti pasaĝerojn en *Liberec*.
Bedaŭrinde, la tramo ne estis tre fidinda por regula ekspluatado. Okazadis problemoj kun elektra ekipaĵo, hidraŭlika bremso de meza boĝio *Duewag*, problemoj ĉe pordoj, rapida defrotiĝo de radringoj ktp. La tramo estis ofte portempe eksservigita, krome post bankroto de fabrika firmao *ČKD* – estis neniu, kiu povus tiujn „infanmalsanojn“ forigi. Trafika oficejo poste ne aprobis tramon por regula ekspluatado. Kun pasaĝeroj ĝi lastfoje ekveturis 25-an de novembro 2003, depost tiam ĝi staris eltrafikigita en veturilbontenejo en *Liberec*. Komence do oni pripensis loki ĝin en iu muzeo, post longaj dek jaroj ĝi estis vendita al kompanio *EFA*, *EDGE FOR ALL s.r.o.* en *Lánov*, kiu okupiĝas pri gastigado kaj liveras servojn kunligataj kun vintraj sportoj.
En decembro 2013 do denove revivis trafiko sur branĉtrako de *DPML* – Trafika entrepreno de la urboj *Liberec* kaj *Jablonec nad Nisou*, kiu estas rekta daŭrigo de klienta trako *Babylon* (kongresejo de la 63-a IFK) ekde km 0,108. La branĉtrako de Trafika entrepreno mem estas 272 metrojn longa. Sur ĝi jam ne okazas transportoj. En pasinto ĝi estis uzata por transporti tramojn el Trafika entrepreno *Liberec* en bontenejojn de Trafika entrepreno en *Ostrava*. Inverse estis en pasintaj jaroj al la branĉtrako transportataj reloj por renovigo de la urba linio.
Lasta priservo de tiu ĉi branĉtrako okazis en novembro 2010, kaj kiam en spaco proksima al amuza centro *Babylon* aperis „Elektra metroŝtono“ 743.007 *ČD Cargo*, temis pri relative grava okazaĵo. Sur la branĉtrakon estis aldonataj du varvagonoj serio *Res*, sur kiujn estis metita tramo RT6S dividita en du partojn. Sur trakoj *DPML* kaj *Babylon* la menciitaj vagonoj venis al fervoja stacio en *Liberec*, de kie ili per regulaj trajnoj *ČD Cargo* estis transportataj al *Vrchlabí*. El tiea stacio la tramo estis transportata al *Herlíkovice*, kie ĝi nun servas kiel atentovekilo por loka skitereno. Laŭplane la tramo estos transformata al kafejo aŭ skiservejo.

**Ĉinio**: ***Novaj fervojlinioj malfermitaj***

Apudmarborda linio inter urboj *Xiamen* kaj *Shenzhen* en sudokcidenta Ĉinio estis 28-an de decembro 2013 solene malfermita por komerca ekspluatado. Antaŭe tiun ĉi trafikan linion 514 km longan trajnoj trairis en 13 horoj, nun ili bezonas tiucele nur 3,5 horojn. Fine de decembro 2013 komenciĝis ekspluatado ankaŭ sur kelkaj aliaj ĉinaj linioj: el *Hengyang* al *Luzhou*, el *Luzhou* al *Nanning*, el *Nanning* al *Beihai*, el stacio *Qinzhou* al urbo *Fangchenggang*, kaj lastan parton de koridoro oriento-okcidento, kunliganta urbojn *Wuhan* kaj *Chongging* kune kun grandrapida linio inter *Xi´an* kaj stacio *Baoji*.

**Germanio**: ***Veturilkompletoj Velaro D aprobitaj pot trafikado***

Germana fervoja oficejo *EBA* en decembro 2013 aprobis trafikadon de veturilkombinaĵoj *Velaro D*, serio *407 DB*, en enlanda trafiko. Aproba traktado de ĉi koncernaj trajnoj en Francio kaj Belgio, kien ili trafikos enkadre de interŝtata grandrapida trafiko, ankoraŭ daŭras. Entute 16 plurkurentaj okvagonaj kombinaĵoj kun kapacito 460 sidlokoj mendis la kompanio *DB AG* jam en jaro 2008. Ilia kosto estis destinita al ĉirkaŭ 500 milionoj da eŭroj. La kombinaĵoj havas povumon 8000 kW kaj povas atingi rapidon 320 km/h.

**Pollando**: ***Arriva ekspansias sur regionaj linioj***

Filia kompanio *DB AG Arriva* akiris dujaran kontrakton por ekspluatado sur kvar regionaj linioj en pola regiono *Województwo Kujawsko-Pomorskie*. Entute 12 veturilkombinaĵoj kaj 80 dungitoj priservos reton kun ĉirkaŭ 50 haltejoj. Financa valoro de la mendo estas 22 milionoj da eŭroj. *Arriva* aktivas sur polaj fervojoj ekde jaro 2007. Ĝis nun ĝi ekspluatis 18 motorvagonkombinaĵojn kaj kun nova kontrakto ĝi atingos povumon 3,8 milionoj da trajnkilometroj en jaro.

**Rusio**: ***Olimpika fajro en trajno***

XXII-a Vintra Olimpiko, kiu okazas 7-an ĝis 23-an de februaro 2014, estas organizata en du centroj: en apudmara urbo *Soči* kaj en montara centro *Krasnaja Poljana*. Temas pri dua olimpiko sur teritorio de Rusa federacio, kaj pri unua vintra olimpiko kiel tia. Jam antaŭ komenco estis evidente, ke olimpikaj ludoj akiros kelkajn mondprimarecojn. Laŭ antaŭtakso ili kostos pli ol 50 miliardojn da dolaroj; do kvinoble pli, ol estis komencaj taksoj de olimpika komitato, kaj pli ol duoblon da elspezoj por antaŭa olimpiko en Londono. Vintra olimpiko en *Soči* do fariĝos la plej multekosta olimpiko en ĝistiama historio.



Olimpika torĉo unuafoje en historio aperis ankaŭ en libera kosmo en kadro de kvarmonata stafeto, komencita 7-an de oktobro 2013 en Moskvo. Temas do pri plej longa – laŭ tempo kaj distanco – nacia stafeto en historio de homaro. Olimpika torĉo pilgrimis sur tero, per fervojo, en akvo, sur sledoj tirataj de boacoj, en montaroj, en batiskafo, en aero, en aviadilo, eĉ en universo. Dum 123 tagoj ĝi trapasis rekordajn 65 000 kilometrojn, vizitis 129 urbojn, kaj trapilgrimis naŭ tempzonojn en ĉiuj 83 regionoj.
La 16-an de novembro 2013 la Olimpika torĉo komencis sian pilgrimadon sur fervojo. En apudmara urbo *Vladivostok* solenan aranĝon partoprenis ankaŭ prezidanto de Rusaj Fervojoj *Vladimir Jakunin*, kiu antaŭe por momento ankaŭ portis la fajron. Pesonalon de trajno, speciale tiucele vestigita de firmaaj koloroj kaj signoj de Vintraj olimpikoj, atendis 38 mil kilometrojn, kiujn oni trapasis dum 83 tagoj, kun halto en 76 urboj. La trajno konsistis el lokomotivo kaj 11 vagonoj inkluzive de du restoracivagonoj. Pli ol 2000 dungitoj de Rusaj Fervojoj partoprenis stafeton, kiun partoprenis entute 14 000 „fajroportantoj“. En la celon torĉo kun fajro venis 7-an de februaro 2014, en inaŭgura tago de la ludoj en Olimpika stadiono en *Soči*.

**Rusio/Finnlando**: ***Trajnkunligo el Helsinko al Peterburgo prosperas***

Trajnoj kun kliniĝtekniko, ekspluatataj sub komerca signo *Allegro* de internacia rusa-finnlanda ligo *(joint venture) Karelian Trains* inter Helsinko kaj Peterburgo festas sukceson. Nombro da vojaĝantoj depost entrafikigo en la jaro 2010 kreskas, kaj en jaro 2014 estas atendataj ĉirkaŭ 450 000. Tio estas ĉirkaŭ duoblo kompare kun ekspluatado de originaj trajnoj ĝis la jaro 2010. La trajnoj reduktis translokadodaŭron sur 450 km longa trajnkurso horara de 6 al 3,5 horoj, kaj precipe dank´ al modernigo de la linioj (en Finnlando ili atingas ĝis 220 km/h, en Rusio ĝis 200 km/h), pli rapida traveturo de kurbiĝoj kaj reduktita restado ĉe landlimoj.

**Svisio**: ***Renoma kafejo veturas sur reloj***

Monda premiero *Starbucks* sur fervojo okazis en Svisio. La unua kafejo *Caffee House* kun tiu ĉi marko estas parto de unu veturilkombinaĵo *ICE 2000*, kiu du fojojn en tago plenumas kunligon sur linio Ĝenevo - *Fribourg* - *St. Gallen*. En unua etaĝo dispone al pasaĝeroj estas ofertata refreŝigaĵo en manon, kiun oni povas forporti al sia sidloko, en supra etaĝo funkcias kutima kafejo. En pasinto trafikis sur svisaj reloj ekzemple ankaŭ vagono kun servoj de *McDonald´s*.

**Usono**: ***Fabrikado de lokomotivoj alportos novajn laborlokojn***

Trafika ministerio en ŝtato Ilinojso en unua duono de decembro 2013 anoncis, ke ĝi por livero de ĉirkaŭ 35 dizellokomotivoj kun maksimuma rapido 200 km/h elektis kaj subskribis kontrakton kun firmao *Siemens*. Ĉiuj komponantoj de dizelelektraj lokomotivoj povas esti fabrikataj en Usono. Ilia muntado okazos en *Sacramento*.
„Tiu ĉi kontrakto kreas laborlokojn, subtenas ekonomian kreskon, kaj plu kreas bazon por daŭriga, longtempa fervojreto de pasaĝertrafiko en Usono“, komentis la anoncon Federacia trafikministro *Anthony Foxx*.

Preparis *Jindřich Tomíšek* Reviziis *Heinz Hoffmann*

La 67-a Kongreso de IFEF
Kunming, Ĉinio 16-23.05.2015
第67届国际铁路员工世界语大会
中国·昆明

Kongresnumero___________

# ALIĜILO POR LA 67-A KONGRESO DE IFEF EN KUNMING, ĈINIO

**16-a ĝis 23-a de majo 2015**

LKK-adreso : Kunming-a Arta Profesia Kolegio, Huan Hu Dong Lu, Distrikto Guandu, Kunming,Yunnan, Ĉinio

Telefonnumero : 86-0871-67328966

Retadreso : 67ifefkongreso2015@gmail.com

Banko-nomo : TUO DONG ROAD BRANCH OF CHINA CITIC BANK, KUNMING, YUNNAN, P.R.CHINA

IBAN: 7302310182600003580

Mi aliĝas al la 67-a IFEF-kongreso en urbo Kunming, Ĉinio.

IFEF-ano jes □ ne □ viro □ virino □

Familia nomo:...................................................................................................

Persona nomo:...................................................................................................

Naskiĝjaro:.......................................

Adreso: strato:...................................................................................................

Poŝtkodo:.......................................... Urbo:...............................................

Lando:...............................................

Telefono:...................................................................

Retadreso:.................................................................

| **Kongreskotizo en eŭroj** | **Ĝis 31.01.2015** | **Poste** | **Sumo** |
|---|---|---|---|
| IFEF-membro | 50 | 70 | |
| Familiano kaj junul(in)o ĝis 30 jaraj kaj loĝantoj el B-landoj laŭ UEA-difino | 25 | 45 | |
| Ne IFEF-membro | 65 | 85 | |
| Ĉambro-perado por aliĝilo | 3 | 3 | |
| Libervola donaco al la kongresa kaso | | | |

## PROPONITAJ EKSKURSOJ EN EŬROJ

| | | | |
|---|---|---|---|
| 18 de majo, lundo | Duontaga ekskurso 1: Parko Cuihu, Fervoja muzeo | 15 | |
| 19 de majo, mardo | Duontaga ekskurso 2: Draka pordo | 25 | |
| 20 de majo, merkredo | Tuttaga ekskurso: Ŝtona arbaro | 50 | |
| 23 de majo, sabato | Krom restado (ekskursoj) x tagoj | | |
| 22-28 de majo | Postkongresa ekskurso: Kunming-Dali-Lijiang-Xishuangbanna (7 tagoj 6 noktoj) | 500 | |
| | Tuta sumo | | |

Loko, dato……………………………….....  Subskribo……………………………



## ANONCO PRI LA FAKPRELEGOJ

*Laŭ la programo de la 67-a IFEF-kongreso estos aranĝitaj fakprelegoj dum la kongreso. La prelegdezirontoj povas anonci sin al LKK* ***antaŭ la 15-a de marto 2015****. LKK elektos la altkvalitajn prelegojn el la diversaj landoj, por ke diverslandaj fervojistoj povu interŝanĝi kaj ĝui la bonajn rezultojn pri la fakaj scienc-teknikoj kaj fervoja evoluo en la mondo. La temoj estos difinitaj de la prelegontoj mem pri la konstruo kaj evoluo de fervojoj, avangardaj fakaj scienc-teknikoj ktp.*

*Bonvolu sendi la prelegojn kun simpla memprezento pri la aŭtoro al la retpoŝta adreso:*< ***67ifefkongreso2015@gmail.com***>.

*Ĉiuj prelegoj estos bonvenaj!*

La 67-a Kongreso de IFEF
Kunming, Ĉinio 16-23.05.2015
第67届国际铁路员工世界语大会
中国·昆明

Kongresnumero___________

# ĈAMBROMENDILO
# POR LA 67-A KONGRESO DE IFEF
# EN KUNMING ,ĈINIO

**16-a ĝis 23-a de majo 2015**

(Bonvolu plenigi la formularon majuskle) s-ro □ s-rino □

Familia nomo: ....................................................................

Persona nomo: .................................................... Naskiĝjaro:……..............…

Adreso: strato...............................................................

Poŝtkodo:……….......... Urbo:................................. Lando:.......................

Mi mendas la jenajn noktojn (Bonvolu kruci laŭ via deziro) :

| Noktoj | 15/16 | 16/17 | 17/18 | 18/19 | 19/20 | 20/21 | 21/22 | 22/23 | 23/24 | 24/… |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | | | | | | |

Ĉambroprezo estas por unu persono kaj por unu nokto kun 3-foja manĝado en memserva restoracio de la hotelo.

| Ĉambroj de Fu Bao Kultura Vilaĝo | Unulita ĉambro | Dulita ĉambro |
|---|---|---|
| Luksa kun saloneto por gastoj | 75,00 € | |
| Normala | 55,00 € | 45,00 € |

■Mi elektas hotelon ………..lita ĉambro.

■Mi deziras loĝi kun:.........................................................................................

■Mi konfirmas, ke mi konsentas kun la Ĝeneralaj instrukcioj presitaj en ĉi tiu aliĝilo kaj aparte deklaras, ke mi havas san-kaj akcident- asekuron por mia restad-tempo en Ĉinio dum la 67-a Kongreso de IFEF.

■Mi konsentas, ke mia nomo, urbo, lando aperu en la kongreslibro. □

■Mi alvenos al Kunming per ……….......... la........... .-an de majo je la…......-a horo.

Loko.………………..dato………….. …... Subskribo……………………..........…...

# PROVIZORA PROGRAMO DE LA 67-A KONGRESO DE IFEF EN KUNMING, ĈINIO

**16-a ĝis 23-a de majo 2015**

| KIAM | | KIO | KIE |
|---|---|---|---|
| 16.05<br>Sab. | 08.00-<br>09:00-10:00<br>10:30-11:30<br>14:00-15:00<br>15:30-17:30<br>19:30-22:00 | Akceptejo/informejo<br>Kunsido de la IFEF kaj LKK<br>Gazetara konferenco<br>Kunsido de ĈEL kaj LKK<br>ILEI-seminario(1)<br>Interkona vespero | En la kunvenejoj de la Vilaĝo |
| 17.05<br>Dim.. | 08:00-<br>08:30-9:00<br>10:00-11:30<br><br><br>11:30-12:00<br>14:00-16:00<br><br>19:00-21:00 | Akceptejo/informejo<br>Akcepto de urbestro<br>Solena inaŭguro de la 67-a IFEF-kongreso kaj la **11-a Ĉina kongreso de Esperanto**<br>Kunfotado<br>ILEI-seminario(2)<br>**Kunsido de fakgrupoj de ĈEL**<br>Nacia vespero | En la kunvenejoj de la Vilaĝo<br><br>En la Kolegio |
| 18.05<br>Lun. | 09:00-10:30<br><br>10:30-12:00<br><br><br><br>13:30-17:30<br><br>19:00-21:00 | Nepublika komitatkunsido de IFEF<br>**Fermo de la 11-a Ĉina Kongreso de Esperanto**<br>Terminara komisiono(1)<br>ILEI-seminario(3)<br>Duontaga ekskurso(1)<br><br>Nacia vespero (Folklora) | En la kunvenejoj de la Vilaĝo<br>Ferfoja Muzeo, Verda Lago<br>En la Kolegio |
| 19.05<br>Mardo | 09:00-10:00<br>10:00-12:00<br>13:30-17:30<br>19:00-21:00 | Plenkunsido de IFEF<br>Fakprelegoj(1)<br>Duontaga ekskurso(2)<br>Internacia vespero | En la kunvenejoj de la Vilaĝo<br>Xi Shan monto<br>En la Kolegio |
| 20.05<br>Mer. | 08:00-17:30<br>19:00- | Tuttaga ekskurso:Ŝtonarbaro<br>Libertempo | |
| 21.05<br>Ĵaŭ. | 09:00-11:30<br>14:00-16:00<br><br>18:00-21:00 | Fakprelegoj(2)<br>Movadaj aferoj kaj fervojaj novaĵoj<br>Bankedo kaj balo | En la kunvenejoj de la Vilaĝo |
| 22.05<br>Ven. | 09:00-10:30<br>10:30-11:30<br>14:30-16:30<br>19:00-21:00 | Terminara komisiono(2)<br>La venontkongreso sin prezentas<br>Solena fermo de IFEF-kongreso<br>Adiaŭa vespero | En la kunvenejoj de la Vilaĝo<br><br>En la Kolegio |
| 23.05<br>Sab. | 08:00-16:30 | Forveturo hejmen aŭ al la postkongreso ekskurso | |

# ĜENERALAJ INSTRUKCIOJ

1. Ĉiu partoprenanto bonvolu plenigi kaj sendi apartan aliĝilon por la kongreso al la adreso de LKK.

2. Sendu la pagon, nur en eŭroj, al la indikita bankkonto de la LKK. Oni traktos la aliĝilon nur post alveno de la pago.

3. Se vi pagas por alia persono, kiu nepre devas sendi apartan aliĝilon, menciu precizajn informojn pri la koncerna persono (nomon, landon, adreson).

4. Kongreskotizo neniukaze estas repagebla. La pagoj por la ceteraj servoj estas repageblaj post la depreno de 10% por administrado, kondiĉe ke LKK ricevis la malmendon antaŭ la 31-a de marto 2015.

5. LKK konfirmos la akcepton de ĉiu aliĝilo post la ricevo de la koncerna pago kun indiko de via kongresa numero kaj de ĉiuj antaŭmenditaj kaj antaŭpagitaj servoj.

6. LKK havas la rajtojn ŝanĝi la prezojn, se inflacio aŭ aliaj ne antaŭvideblaj kondiĉoj postulus tion.

# KIEL ATINGI LA KONGRESURBON KUNMING?

Aviadile rekte aŭ unue al flughavenoj de Beijing/Shanghai/Guangzhou/Hongkong kaj aliaj urboj kaj poste aviadile aŭ trajne vi povas atingi la kongresurbon Kunming.

☻Ĉe la Internacia flughaveno Kunming(Changshui) kaj fervojstacidomo LKK-anoj kun volontuloj de la kongreso akceptos kongresanojn de diversaj landoj.









**Ĉina Fervojista Esperanto-**
**Asocio (ĈFEA)**
NO. 1 Gaolou, 36 Hao,
Tieluju Houyuan Sushe,
Huhehaote Neimenggu
010057 Ĉinio

Honora prezidanto **:Li Sen**
Tel:86-471-2244400
<gaols720@163.com>

Prezidanto: **HAN Zuwu**
Jin Wan Hua Yuan 28-4-201,
Cheng Lin Lu, Hedong Qu，
Tianjin 300161 Ĉinio
Tel./fakso: 86-22-84511237
<hanzuwu@hotmail.com>

Vicprezidanto: **Xiao Ke**
Tel.13789511975
<xkstepo@126.com>

Vicprezidanto:**Wang Minhao**
Tel.13651804957
<shesperantoasocio@gmail.com>

Ĝenerala sekretario:**ZHANG Dali**
Tel.13552063926
<fortego@sina.com>

Vicĝenerala sekretario:**Chi Tienan**
Tel.86-471-6247994
<ferulo@163.com>

Vicĝenerala sekretario/
Kasistino:
**ZHANG Jianjun**
Tel: 86-471-2242954
<jjz-sana@163.com>




## Skizo pri Kunming

*Kunming nomata Printempa urbo estas la ĉefurbo de Yunnan-provinco, la politika, kultura, ekonomia kaj scienc-teknika Centro de la provinco, la nodo de trafiko kaj komunikado. Sub la urbo Kunming estas kvin distriktoj:Wuhua, Panglong, Xishan, Guandu kaj Dongchuan, ok gubernioj: Jinning, Chenggong, Yiliang, Shilin, Songming, Fuming, Luquan kaj Xundian ankaŭ unu suburbo Anning. La urbo Kunming havas unu milionon da loĝantoj kaj 2 milionojn da enmigrintaj loĝantoj de aliaj lokoj .*

*En Kunming troviĝas amaso da naturaj vidindejoj kaj antikvaj ruinoj. 108 humanaj kaj naturaj vidaĵoj strukturas platformon de la urba turismado kaj elvolvas la distingan turisman kulturon. Kunming posedas apartan avantaĝon en ekonomia kresko. La afabla medio kaj la ekologia situo faras la urbon plej bona loko por la homa vivado. Diversaj naciecoj nutras la distingitan turisman kulturon per kolorriĉaj moroj.*

*Kunming kiel perlo estas enkrustita ĉe la altebenaĵa lago—Dianchi.*

*- Red.*